


Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 1143

2023-11-21

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO (INK): 4-A ELDONO LANĈITA KUN NOVA TEMO

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) alvenas kun nova temo: **Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens***. La kvara eldono de la konkurso estis lanĉita dum la oktobra Retoso kaj estas rezulto de daŭra kunlaboro kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE), Bobelarto kaj aldone aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj per la eblo konkursi en ses diversaj lingvoj: krom Esperanto, eblas konkursi en la itala, la kataluna, la persa, la rusa kaj la ukraina. Tradukaĵoj el aliaj lingvoj daŭre bonvenas.



Eblas gajni en la du kategorioj de komencantaj kaj spertaj verkistoj entute dek monpremiojn kun la suma valoro 4500 eŭroj. La prezidanto de la konkurso estas irana esperantisto Ahmad Mamduhi, kiu estas ankaŭ prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longo. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas menciigi en la sendof formularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 110-a Universala Kongreso de UEA en 2025. En la komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de junio 2024.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la tria eldono, kies temo estis *La sekreta vivo de miaj najbaroj*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 1331 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 48 landoj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 109-a UK, okazonta en Aruŝo, Tanzanio (3 aŭgusto-10 aŭgusto 2024). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: uea.org/kongresoj/alighilo.

La du novel-rikoltoj de la antaŭaj eldonoj de la konkurso estas aĉeteblaj en la Libroservo de UEA (*Amo, tuso kaj forpaso* katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=669 kaj *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj* katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=233), ankaŭ ĉe eldonejo KAVA-PECH (*Amo, tuso kaj forpaso* kaj La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj)